
# JEN BULTENO

12

ELDONATA DE LA
JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO



1963
Okt-Nov

BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO

Sendu kotizojn al Stanley Cohen, 16 Long Ave., Allston, Mass., Redakciajn Aferojn al Allan E. Fineberg, 76 17th Avenue, Paterson, N J.; Ĝeneralajojn al: Richard Kollin, 30 Avenue B, New York 9, N. Y. -- JARABONO: $1.00 aŭ egalvaloro.

JEN Estraro:

| | |
|---|---|
| Richard P. Kollin | Sekretario |
| Allan E. Fineberg | Redaktoro |
| Stanley Cohen | Kasisto |
| John F. Kooistra | Komisiito pri Universitatanoj |
| Humphrey Tonkin | Komisiito pri Eksterlandaj Aferoj |
| Jonathan Pool | Komisiito pri Varbado |

* * * *

ENGLISH SPEAKERS !!

Learn Esperanto at home! The Esperanto Education Center offers you two outstanding ways to learn:

1. The Teach Yourself Esperanto Kit. Contents selected from around the world!

   From England: "Teach Yourself Esperanto"
   From France: 45 rpm Pronunciation Record
   From Canada "Esperanto" (introductory booklet)
   From 3 other countries. Beautiful samples of Esperanto used in tourist information, etc.
   Plus: Booklist, International Correspondence Blank, 3600-word English-Esperanto Vocabulary, and other items.

ALL FOR THE BARGAIN PRICE OF $4.00

(Cont'd on back page)

## VORTOJ DE LA SEKRETARIO

MI PETAS ĈIUJN LETERSENDINTOJN, KE ILI NE MALTRANKVILIĜU PRO MANKO DA RESPONDOJ MIAFLANKE. LASTATEMPE MI ESTAS TIEL OKUPITA PRO MIAJ LERNEJSTUDOJ, KE MI DEVIS LASI KELKAJN GRAVAJN LETEROJN SEN RESPONDO. MI PETAS, KE VI ESTU PACIENCAJ KAJ BALDAŬ ĈIUJ LETERSENDINTOJ RICEVOS RESPONDON. JEN KOMENCIS DEVIĜI ALIĜPAGON EN NOVEMBRO LASTJARE. DO, MIAJ UNUAJ MEMBROJ DEVAS ALIĜI DENOVE POR LA VENONTA JARO. SIMPLE SENDU UNU DOLARON AL STAN COHEN, 16 LONG AVENUE, CAMBRIDGE 38, MASS. ONI ESPERAS, KE ĈIUJ MEMBROJ KIUJ ALIĜIS TIAM ALIĜOS AL JEN DENOVE.

ĈU VI SCIIS, KE LA JEN KONGRESO DE 1964 OKAZOS EN NOV-JORKO KUNE KUN LA ELNA KONGRESO? AMBAŬ KONGRESOJ (EN LA STATLER HILTON, 34TH ST. KAJ 8TH AVE.) OKAZOS SAMTEMPE JULIO 1 – JULIO 5. POST LA ELNA/JEN KONGRESOJ, MULTAJ PERSONOJ INTENCAS VOJAĜI REKTE AL EŬROPO POR UNU AŬ DU SEMAJNOJ ANTAŬ LA UEA KONGRESO. ĈU VI INTENCAS IRI? KONTAKTU NIN PRI ARANĜOJ SE VI VOLAS KUNFLUGI.

HUMPHREY TONKIN FARIS INTERESAN EKSPERIMENTON (TRE SUKCESPLENAN) ĈE HARVRDA UNIVERSITATO LASTATEMPE. LI ANONCIS, KE LI INSTRUOS KLASON EN LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO DUM LA KOMENCIĜONTA SEMESTRO SED NUR AL 9 STUDENTOJ......POZITIVE NE PLU. TIOM DA PERSONOJ VENIS AL LA UNUA KLASO, KE LI DEVIS PETI ETAN ESEON DE ĈIU KANDITATO PRI LA TEMO "KIAL MI VOLAS STUDI ESPERANTON" INTER LA ESEOJ, LI SELEKTIS NAŬ. LA ALIAJN LI MALAKCEPTIS. POST IOM DA PROKRASTADO KAJ PLEDADO, ALIAJ MEMBROJ DE LA HARVARDA ESPERANTO KLUBO KONSENTIS INSTRUI LA ALIAJN ENTUXZ ENTUZIASMULOJN. DO, EBLE TIU ĈI PRESTIĜA METODO HELPOS AL VI EN VIAJ VARBAGADOJ, ĈU NE

ĴUS RICEVIS TRE INTERESAN PLANON DE ESPERANTO PRESS PRI ESPERANTO TRADUKO DE LA MONDFAMA "DUDEN" SERIO ESPEREBLE APERIGEBLA EN NIA LINGVO. MI VERKOS MUŜE PLI GRANDA ARTIKOLO PRI LIA PLANO EN LA SEKVONTA JEN-BULTENO. SE IU INTERESIĜAS HELPI LIN (ONI RICEVOS REKOMPENCON) SKRIBU AL S-ANO EICHHOLZ, ESPERANTO PRESS, OAKVILLE, ONTARIO, KANADO.

ĈIRKAŬ 50 PERSONOJ ĈEESTIS LA JEN-FESTETON EN NOV-JORKO ANTAŬ 2 SEMAJNOJ. POR NIAJ DU GASTOJ DE JAPANIO, S-RO DEGUĈI KAJ S-RO UMEDA. ILI NIN DISTRIS TIEL BONE KUN ILIAJ DELEGA NO-MUZIKO, KIEL LA AŬSKULTANTARO ESTIS SILENTIGITA DUM KRESKAŬ DUONHORO. ESTAS NOV-JORKA REKORD-ROMPO, ĈU NE?

KOMPATU ĈI TIUN MULTOKUPATAN MONSTRON, HOM-MALARO

E.E. CUMMINGS

KOMPATU ĈI TIUN MULTOKUPATAN MONSTRON, HOM-MALARO,

NENIEL. PROGESO ESTAS KOMFORTA MALSANO;
VIA VIKTIMO (MORTO KAJ VIVO SENDANĜERE FORAJ)

LUDAS KUN LA GRANDECO DE LIA MALGRANDECO
——ELEKTRONOJ DEIGAS UNU RAZILTRANĈILON
MONTARGRANDEN, LENSOJ ETENDAS

NEDEZIRON TRA KURBANTA KIEKIAM ĜIS NEDEZIRO
REVENAS AL ĜIA MALMEM.

MONDO DE FARITA
NE ESTAS MONDO DE NASKITA — — KOMPATU KOMPATINDAJN
KARNON
KAJ ARBOJN, KOMPATINDAJN STELOJN KAJ ŜTONOJN, SED
NENIAM ĈI TIUN BONAN SPECIMENON DE SUPERMAGIA

ULTRAĈIOPOTENCECO. NI KURACISTOJ KONAS

SENESPERAN KAZON SE— AŬSKULTU: TROVIĜAS DAMNITE
BONA UNIVERSO APUDE; NI IRU
((((((((((((((((((((((((((((((((((((((((((((((((

## EN STACIO DE LA METRO

EZRA POUND

LA PERAĴO DE ĈI TIUJ VIZAĜOJ EN LA HOMAMASO;
PETALOJ JE MALSEKA, NIGRA BRANĈO

## LA VOJMARŜANTO

STEPHEN CRANE

LA VOJMARŜANTO
EKVIDANTE LA VOJETON AL VERECO,
ŜOKIĜIS PRO SURPRIZO.
ĜIN KOVRIS DENSAJ KRESKAĴAĈOJ.
"HO," LI DIRIS,
"MI VIDAS, KE JAM DELONGE
NENIU TRAPASIS ĈI TIE."
PLIPOSTE, LI VIDIS KE ĈIU ERO
ESTIS AKREGA TRANĈILO.
"NU," LI FINFINE MURMURIS,
"SENDUBE TROVIĜAS ALIAJ VOJOJ."

## NI JA VENKOS

JEN LA ESPERANTA TRADUKO DE LA KONATA BELA KANTO DE NEGRAJ USONANOJ LUKTANTAJ ĈIE TRA USONO POR LA EGALRAJTECO. ĈI TIUN TRADUKON KANTIS JEN-ANAJ PARTOPRENANTOJ ĈE LA AMASDEMONSTRACIO EN VAŜINGTONO.

NI JA VENKOS,
NI JA VENKOS,
NI JA VENKOS IAM,
HO EN MIA KOR' MI KREDAS,
NI JA VENKOS IAM.

NI MARŜOS MAN-EN-MANE,
NI MARŜOS MAN-EN-MANE,
NI MARŜOS MAN-EN-MANE IAM,
HO EN MIA KOR' MI KREDAS,
NI JA VENKOS IAM.

VEREC' NIN LIBERIGOS,
VEREC' NIN LIBERIGOS,
VEREC' NIN LIBERIGOS IAM,
HO EN MIA KOR' MI KREDAS,
NI JA VENKOS IAM.

NI VIVOS EN PACO,
NI VIVOS EN PACO,
NI VIVOS EN PACO IAM,
HO EN MIA KOR' MI KREDAS,
NI JA VENKOS IAM.

NI NE TIMAS,
NI NE TIMAS,
NI NE TIMAS IAM,
HO EN MIA KOR' MI KREDAS,
NI JA VENKOS IAM.

TRA LA TUTA MONDO,
TRA LA TUTA MONDO,
TRA LA TUTA MONDO, IAM,
HO EN MIA KOR' MI KREDAS,
NI JA VENKOS IAM.

("WE SHALL OVERCOME" TRAD. ESPERANTEN: AEF)

* * * * * * * * * * * * * *

## KIAL MI MALAMEGAS "USONON"

LA SPIRITO

ĈEBLE TIU ĈI TITOLO SURPRIZOS VIN. MI ESPERAS, KE JES! ĈAR MI DEVAS MALKAŜI MIAJN PLEJ PROFUNDAJN SENTOJN POR MONTRI AL VI, KARA LEGANTO, KIOM DA MALAMEGO KONTRAŬ "USONO" MI SENTAS, MALGRAŬ TIO, KE MI MEM ESTAS "USON"-ANO.

SED TRANKVILIĜU AMIKOJ! NE KURU AL LA PLEJ PROKSIMA TELEFONO POR TELEFONVOKI AL LA FBI AŬ CIA. FAKTE MI AMAS MIAN LANDON, SED MIN NAŬZAS TIU NEIMAGEBLE STULTA FIVORTAĈO! MI SURKRAĈAS ĜIN. MILFOJE FI KAJ AĈ!!! LA VORTO ESTAS PROVOKA INSULTO!

ĈU VI POVAS MENCII IUN AJN ALIAN LANDNOMON EN ESPERANTO, KIU ESTAS NUR ARO DA PRONONCEBLAJ LITEROJ ANSTATAŬ REALA NOMO? MIAOPINIE, PRONONCEBLAJ LITEROJ ANSTATAŬ VERA NOMO ESTAS INSULTO, PRECIPE ĈAR NENIU POVAS EĈ DIVENI LA NOMON SEN HELPO! NEK USONANOJ NEK EKSTERLANDANOJ (NE ESPERANTISTOJ) POVAS DIVENI LA SIGNIFON DE "USONO"! EN USONO ONI KUTIME DIRAS UNITED STATES OF AMERICA (ESP: UNUIĜINTAJ ŜTATOJ DE AMERIKO); TIAL, LA INICIALOJ ESTAS USA (ESP: UŜA). USONANOJ NENIAM MENCIAS LA "NORDECON" DE ILIA LANDO EN TIES NOMO. SE ONI TION FARUS, LA INICIALOJ ESTUS TIAL CERTE USONA KAJ LA LANDO USONAO. ESPERANTISTOJ EĈ MALSAKRAS LA LITEROJN MEM! NENIE EN USONO ESTAS LA VORTETO "OF" KONSIDERATA KIEL ERO DE LA INICIALARO, TIAL LA SEN-OF'A (SEN-DE'A) INICIALARO DONUS AL ESPERANTO LA LANDNOMON USNAO, KIUN NI DEVUS AKCEPTI, NEPRE BAZANTE NIAN ELEKTON SUR LA LITER-PRONONCEBLECO DE LA PRATEMPO

KION FARI KUN TIU VORTO? ĜI ESTAS AĈ-ASPEKTA KAJ SONAS TRE STRANGE EN ĈIU AJN LINGVO. 'USONO' ESTAS INSULTO AL USONANOJ ĈAR ONI SENTAS, KE NIA LANDO ESTAS NUR IA HAZARDA PRONONCEBLA MAL-LONGIGO. ANKAŬ LA LITEROJ MEM SIGNIFAS NENION AL NE-ESPERANTISTOJ USONANAJ KAJ EKSTERLANDAJ. SE NENIU AJN EN LA MONDO EKSTER LA ESPERANTISTARO EĈ KOMPRENETAS ĜIN, LA VORTO USONO ESTAS IA SEKRETA KODVORTO INTER NI ESPERANTISTOJ!!!!!

ĈU NI TROVU NOVAN VORTON PLI BONAN KAJ DIGNAN? MI KREDAS KE JES. EĈ MALGRAŬ LA ZAMENHOFA UZADO DE LA VORTO USONO. (ONI TUŜAS ĈI TIE SANKTECAN AFERON) PENSU MONENTE! KION NI POVAS UZI? AMERIKIO? NE. TRO PROKSIMA AL AMERIKO, KAJ TIU ESTAS LA TUTA HEMISFERO. AMERIKUMIO? TRO LONGA KAJ PEZA. JUESEJO? FI! UNU-IĜINTAJ ŜTATOJ DE AMERIKO? BONA SED TRO LONGA. KAPITALUJO? NE, TRO POLITIKA-EKONOMIA. JUNAJTED STEJTS OV AMERIKO? VE! TRO STRANG-ASPEKTA. RIĈULIO? NE. ANKAŬ MALVERA!

SE NI FORĴETAS TIUJN NOMOJN, KAJ LA MALLONGIGOJN KIEL USONO, USAO, USONAO, UŜNAO, UŜDA, UŜNA, UŜO, USO, UŜA, NI ANKORAŬ NE HAVAS SOLVON. EKZEMPLE, KION FARIS NIAJ NOVAJ SAMALIANCANOJ PRI ILIA GRANDEGA NOMO SOJUZ SOVJETSKIĤ SOCIALISTIĈJESKIĤ RESPUBLIK? ĈU ILI KONSTRUIS IAN SOJSOVSOC-RESPUBLIKON? NE. ONI DECIDIS UZI LA FRANCAN FROMON UNION SOVIET (SOVJET-UNIO).....

JEN LA BELSONA, KOMPRENEBLA, LOGIKA, MALLONGA, BONASPEKTA, KAJ FACILE MEMOREBLA SOLVO! MI, DO, PROPONAS LA SAMAN. MI PROPONAS UZI LA FRANCAN FORMON DE LA NOMO DE NIA LANDO, ETATS-UNIS, SED ESPERANTIGITA. LA TUTA NOMO ESTOS "ŜTAT-UNIO DE AMERIKO" KAJ LA KUTIMA FORMO ESTOS ŜTAT-UNIO! ĈU VI ŜATAS ĜIAN ASPEKTON? SONON? LOGIKON? ĈU VI VOLAS ESTI ŜTAT-UNIANO? SE VI ŜATAS LA IDEON, KOMENCU SKRIBI AL VIAJ EKSTERLANDAJ AMIK(IN)OJ UZANTE LA VORTON 'ŜTAT-UNIO (USONO)" KAJ BALDAŬ NI SCIOS ĈU NIA DEZIRO ESTAS TUTMONDE AKCEPTITA AŬ NE. SE VI HAVAS PLI BONAN SUGESTON, SENDU ĜIN AL OPINIO, JEN-BULTENO, ALLAN FINEBERG, 76-17TH AVENUE, PATERSON 3, NEW JERSEY. NI FARIĜU ŜTAT-UNIANOJ!

ANONCO DE CONRAD FISHER, SEKRETARIO DE ELNA:

MI HAVAS DU PAKAĴOJN DA BROŜUROJ PRI "OKCIDENTA TERITORIO DE GERMANUJO" TRO PEZAJ POR LETEROJ! JEN-ANOJ SENDU 4-CENDAN POŜTMARKON POR RICEVI EKZPEMPLERON.

CONRAD FISHER
808 STEWART ST.
MEADVILLE, PENNSYLVANIA

double space

# Noto Pri Parola Tabuo

## NOTO PRI PAROLA TABUO

S. I. HAYAKAWA

LA INFLUEMAJ KROMSIGNIFOJ DE KELKAJ VORTOJ INTERMETAS OBSTAKLOJN, KELKFOJE GRAVAJN OBSTAKLOJN, JE KOMUNIKADO. EN KELKAJ SOCITAVOLOJ, EKZEMPLE, ESTAS "NEĜENTILE" PAROLI PRI MANĜADO. SERVISTINO EN TELEFONA KONVERSACIO DEVAS DIRI, "SINJORO JONES ESTAS ĈE TAGMANĜO," KAJ NE "SINJORO JONES MANĜAS TAGMANĜON." LA SAMA HEZITADO PRI [redacted]O TRO (alude) KLARA PRI MANĜADO MONTRIĜAS EN LA ŜPAREMA UZADO DE LA FRANCA KAJ JAPANA VORTOJ POR "MANĜI," MANGER KAJ TABERU; SIMILA DELIKATECO EKZISTAS EN MULTAJ ALIAJ LINGVOJ. ANKAŬ KIAM KREDITOROJ ALSENDAS KAMBIOJN, ILI PRESKAŬ NENIAM MENCIAS "MONON," KVANKAM TIU ESTAS LA TEMO. ESTAS MULTAJ SPECOJ DA ĈIRKAŬDIROJ: "NI ESTUS DANKEMAJ PRO VIA FRUA ZORGO PRI ĈI TIU AFERO." "ĈU NI POVAS ANTAŬVIDI TUJAN ALSENDON?" PLIE, NI DEMANDAS...KIE ESTAS LA "RIPOZEJO," AŬ "NECESEJO," KVANKAM NI NEK INTENCAS RIPOZI, NEK BEZONAS ION; JA, NE EBLAS ĜENTILSOCITAVOLE DIRI, SEN UZO DE MEDICINA VORTARO, KIAN CELON HAVAS "RIPOZEJO." LA VORTO MORTINTA SAME ESTAS UZATA TIEL MALOFTE KIEL EBLE, DE MULTAJ HOMOJ, KIUJ ANSTATAŬAS ILIN PER TIAJ FRAZOJ KIAJ "IRINTA OKCIDENTEN" "FORPASINTA" "IRINTA AL SIA REKOMPENSO" KAJ "FORIRINTA." EN ĈIU LINGVO TROVIĜAS LONGA LISTO DE TIAJ ZORGE EVITATAJ VORTOJ KIES INFLUEMAJ KROMSIGNIFOJ ESTAS TIEL NEPLAĈAJ AŬ NEDEZIRATAJ KE HOMOJ NE POVAS ELBUŜIGI ILIN EĈ KIAM ILI ESTAS BEZONATAJ.

* * * * * * *

PRO ĈI TIAJ KIALOJ, LA UNUAJ PAŜOJ EN PRISEKSA EDUKADO, ĈU INTER PLENKRESKULOJ AŬ EN LERNEJOJ, KUTIME ESTAS TUTE LINGVISTIKAJ. POR LA PLEJMULTO DE LA ĜENERALA PUBLIKO, LA NETEKNIKA VORTARO PRISEKSA ESTAS NEUZEBLA, KAJ LA TEKNIKA VORTARO ESTAS NEKONATA. TIAL, ANTAŬ INSTRUADO INFLUEME NEŬTRALA SEKSA VORTARO DEVAS ESTABLIĜI.

TAMEN, LA PLI FORTAJ PAROLAJ TABUOJ HAVAS REALAN SOCIAN VALORON. KIAM NI ESTAS EGE KOLERAJ KAJ NI SENTAS LA NECESON ESPRIMI NIAN KOLERON PERFORTE, LA ELDIRADO DE ĈI TIUJ MALPERMESATAJ VORTOJ DONAS AL NI RELATIVE SENDANĜERAN PAROLAN ANSTATAŬILON POR FRENEZEGIĜO KAJ MEBLARROMPADO; T.E., ILI AGAS KVAZAŬ SAVKLAPO DUM NIAJ MOMENTOJ DE KRIZO.

ESTAS MALFACILE TUTE EKSPLIKI KIAL KELKAJ VORTOJ HAVAS TIEL POTENCAJN INFLUEMAJN KROMSIGNIFOJN, SED NE ALIAJ KUN LA SAMAJ KROMSIGNIFOJ. KELKAJ EL NIAJ PAROLAJ TABUOJ, SPECIALE LA RELIGIAJ, MEMEVIDENTE DEVENAS DE NIA PRAA KREDO JE VORTA SORĈADO; LA NOMOJ DE DIOJ, EKZEMPLE, ESTAS OFTE TRAKTATAJ KVAZAŬ TRO SANKTAJ POR ELBUŜIGI. SED ONI NE POVAS EKSPLIKI ĈIUJN TABUOJN LAŬ VORTO-SORĈADO. LAŬ LA OPINIO DE KELKAJ PSIKOLOGIISTOJ, NIAJ PAROLAJ TABUOJ PRI SEKSO KAJ FIZIOLOGIO PROBABLE DEVENAS DE LA FAKTO, KE NI ĈIUJ HAVAS IUJN SENTOJN, PRO KIUJ NI TIEL HONTAS, KE NI NE VOLAS KONFESI EĈ AL NI MEM KE NI HAVAS ILIN. TIAL NI INDIGNAS PRI VORTOJ KIUJ MEMORIGAS NIN PRI TIUJ SENTOJ, KAJ NI KOLERIĜAS JE DIRANTO DE TIAJ VORTOJ. TIA EKSPLIKO KONFIRMUS LA PLI-MALPLI KUTIMAN OBSERVON KE KELKAJ EL LA FANATIKULOJ KIUJ PLEJ FORTE KONTRAŬSTARAS "MALPURAJN" LIBROJN KAJ TEATRAĴOJN AGAS TIEL NE ĈAR ILIAJ MENSOJ ESTAS SPECIALE PURAJ, SED ĈAR ILI ESTAS SPECIALE NESANAJ.

ĈERPITA EL LANGUAGE IN THOUGHT AND ACTION (LINGVO EN PENSADO KAJ AGADO)
HARCOURT, BRACE & CO. TRADUKIS: AEF

De JEN Bulten Okt/Nov 1967

# POR LA FESTOTAGOJ

Salutkartoj "ESPO"

Bele kaj Ĉarme

Tradicie kaj Alloge

Okulfrape kaj Lukse

Simple kaj Altnivele

Esprimas Vian Deziron

ke

Ĉiuj havu Ĝojan Kristnaskon —

SENDU "ESPO"-KARTOJN ANKAŬ

AL VIAT NE-ESPERANTISTAJ

GEAMIKOJ

ESPO

MRS. G.W.

7434 S.W.

PORTLAND

USON

ESPERANTO SOCIETO

DE PORTLAND, OREGON


DEK KARTOJ
$1.00 (Usona) — 13 Steloj

ARDS

ORMAN

TH AVE

OREGON



FOR THE HOLIDAYS

"ESPO" Greeting Cards

Beautifully and Charmingly

Traditionally and Attractively

Strikingly and Luxuriously

Simply and Tastefully

Express Your Wish For A

MERRY

CHRISTMAS

TO ALL!

## INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN BULGARIO

DE HUMPHREY TONKIN

PRI KONGRESOJ MI KVAZAŬ VETERANAS: TIU EN VRACA ESTIS JAM MIA KVARA TEJO-KONGRESO. SUB TIUJ KONDIĈOJ, MI SIMPLE NE SCIAS KION VI SCIAS PRI — KIO ESTAS TEJO-KONGRESO, KIO OKAZAS TIE, KIUSPECAJ HOMOJ ĈEESTAS, KAJ TIEL PLU.

SED MI DIRU JAM NUN KE TIO NE APARTE GRAVAS, ĈAR LA KONGRESO EN VRACA, BULGARIO, KIUN MI ĈEESTIS DUM LA SEMAJNO ANTAŬ LA UNIVERSALA KONGRESO EN SOFIO SIMPLE NE SIMILIS IUN AJN TEJO-KONGRESON KIUN MI ANTAŬE PARTOPRENIS.

VRACA ESTAS PROVINCA URBO EN LA NORDA PARTO DE BULGARIO — PLI-MALPLI FOR DE LA KUTIMAJ TURISTAJ ŜPUROJ SED TAMEN TRE BELA, TRE KAMPARANA, KAJ RELATIVE PRIMITIVA. MI UZAS TIUN VORTON PRIMITIVA LAŬ PLEJ BONA SENCO: LA HOMOJN MI TROVIS KELKFOJE IOMETE NAIVAJ, SED REZULTE SINCERAJ KAJ (IO KIO BELE ANAKRONISMAS ĈI TIE EN LA OKCIDENTO) HONESTAJ; EN VRACA MEM LA STRATOJ PURAS, SED AKVO TRE OFTE MANKAS, KAJ NECESEJAN PAPERON ONI TUTSIMPLE NE LIVERAS.

EN TIUN PITORESKAN MONTARAN URBON VENIS FINE DE JULIO IU POR LA ENLOĜANTOJ GAPIGA INUNDO DE PLI OL 500 JUNAJ GEESPERANTISTOJ, EL DUDEKO DA LANDOJ. ILI ALVENIS POST, TRE OFTE, PLEJ BUNTAJ AVENTRUOJ SURVOJE — MI MEM VENIS PER TRAJNO DU HOROJN MALFRUA, MEZE DE LA NIKTO, AVERTINTE PRI MIA ALVENO PER TELEGRAMO KIUN LA POŜTOFICEJO NE LIVERIS (MI NE SCIAS KION FARAS LA BULGARA POŜTOFICEJO KUN TELEGRAMOJ, SED MI HEZITAS IMAGI) — ILI VENIS EL PLEJ DIVERSAJ LANDOJ, SED ILI VENIS ĈIUJ POR PASIGI VERE NEFORGESEBLAN SEMAJNON EN VRACA.

MI NE ĈI TIE KLARIGU ĈION KIO OKAZIS DUM LA SEMAJNO; TIO NECESIGUS TUTAN LIBRON. NI KUNE FESTIS, KAJ DANCIS KAJ ĜENERALE SKANDALIS — KIEL KUTIME ĈE TEJO KONGRESOJ, SED ĈI FOJE EBLE EĈ PLI GRANDFORMATE; OKAZIS GRANDIOZA BELARTA VESPERO, KUN PARTOPLENO DE JA PROFESIA STUDENTA KABAREDO EL VORSOVIO, KABAREDO ANKAŬ EL JUGOSLAVIO, DU LUDANTOJ EL JAPANIO, SKOTOJ, BULGAROJ KAJ ĈIUSPECAJ GEULOJ; LA URBA OPERA TRUPO PREZENTIS TRE SUKCESAN OPERON; NI EKSKURSIS DIVERSLOKEN, INTER ALIE AL LA INSULO "ESPERANTO" EN LA DANUBO (INSULO NOMITA DE GEESPERANTISTOJ KIUJ TIE LOĜIS ANTAŬ LA MILITO), KAJ AL KOOPERATIVA BIENO; OKAZIS OFICIALAJ KUNVENOJ, PRELEGOJ, ORATORA KONKURSO (KUN TAMEN BELA MALKONSENTO PRI LA VENKINTO INTER LA ĈEESTANTARO UNU-FLANKE KAJ LA JUĜANTARO ALIFLANKE), PRELEGOJ

(DAŬRIGO DE ARTIKOLO SUR PAĜO ).

KAJ TRI APARTE SUKCESAJ DISKUTAJ GRUPOJ PRI POLITIKAJ TEMOJ — KAJ LA TUTA PROGRAMO ESTIS MIRINDE BONE ORGANIZITA DE LA BULGARA JUNULARO, SUBTENATA DE LA URBAJ INSTANCOJ, TIEL KE PRESKAŬ ĈIO IRIS TUTE LAŬPLANE, SEN ATENDADO, SEN FUŜADO. LA PLEJ GRANDA PARTO DE LA KONGRESANARO LOĜIS EN LERNEJO EN LA URBO, KAJ NI ĈIUJ MANĜIS KAJ KUNVENIS EN LA URBA TEATRO KAJ TIES APUDAJ RESTORACIO KAJ ĈAMBROJ.

PERSONE MI APARTE MEMOROS LA (PARENTEZE PRESKAŬ SUFOKAN) GASTAMON DE LA BULGAROJ — ĈU ESPERANTISTOJ ĈU NEESPERANTISTOJ; LA LASTAN VESPERON KIAM ONI ELEKTIS MISS ESPERANTO (GAJNIS HUNGARINO, KUN GERMANINO KAJ SVEDINO EN DUA KAJ TRIA LOKOJ); LA BELAN TAGON ĈE LA STRANDO DE LA INSULO ESPERANTO; LA LONGAJN KUNVENOJN DE LA ESTRARO KAJ KOMITATO DE TEJO; LA DISKUTAJN GRUPOJN KAJ LA LONGAJN KONVERSACIOJN KUN ESPERANTISTOJ PRECIPE EL ORIENTA EŬROPO; LA FLAGOJN, LA GAJECON, LA EBRIAN DIBOĈON DE LA (IMAGU!) URBESTRA AKCEPTO; LA OFTAJ CETERAJ DELIKATAJ EBRIECOJ DUM LA RESTO DE LA SEMAJNO... MALFELIĈE KE EĈ TEJO-KONGRESOJ DEVAS FINIĜI.

EN RAPORTON PRI VRACA MI NE TRO TRUDU ANKAŬ DETALOJN PRI LA POSTA SEMAJNO DE LA UNIVERSALA KONGRESO EN SOFIO: TIUJN VI POVAS LEGI EN ALIAJ E-GAZETOJ. SED MI NE POVAS NE MENCII LA DOLORIGAN KONTRASTON INTER LA ORGANIZADO DE LA DU KONGRESOJ. LA PROGRAMO DE LA UNIVERSALA KONGRESO BONIS (ALMENAŬ POTENCIALE), LA LOĜIGO BONIS, LA KONGRESANOJ BONIS, NUR LA ORGANIZO MANKIS. NENIAM ANTAŬE DUM MIA TUTA ESPERANTISTECO MI VIDIS ION SIMILAN: EĈ LA PLEJ ELEMENTAJ AFEROJ FUŜIĜIS. ŜAJNE ĈIUJ MANKOJ ŜULDIĜAS AL KVAZAŬ INFERA KOMPLOTO DE LA LKK KAJ LA BULGARAJ INSTANCOJ, KIES KOMBINAJ KAPRICOJ KAJ KARAMBOLOJ BELE KAOSIGIS LA PLEJ ETAJN AFEROJN. EN ĈIO ĈI, SUPOZEBLE, UEA NE MULTE KULPIS, SED LA FUŜOJN LA ESPERANTISTOJ NEEVITEBLE ASOCIIGAS KUN UEA. NI ESPERU, KE EN HAGO VENONTJARE ĜI LERNOS PER LA ERAROJ DE SOFIO.

SED LA MIRINDA NEKOMPETENTO DE LA BULGARAJ PLENAĜULOJ NE INFEKTIS LA GEJUNULOJN. TEJO-KONGRESOJ ĈIAM ESTAS UNIKA TRAVIVAĴO — LAŬ MI EBLE LA PLEJ KONVINKA TRAVIVAĴO PRI LA UTILECO KAJ FUKCIKAPABLO DE ESPERANTO — KAJ EN VRACA ONI ALDONIS BRILAN SUKCESON AL LA JAM HELA VICO DE INTERNACIAJ JUNULARAJ KONGRESOJ. EN VRACA ĈEESTIS 1 1/2 USONAJ REPREZENTANTOJ... KIAL NE 10 VENONTJARE EN AMSTERDAM?

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## ĈU VI NE FORGESIS ION......

FORGESADO——EN LA PRAKTIKA UZADO DE NIA INTELEKTO, FORGESADO ESTAS TIEL GRAVA FUNKCIO KIEL MEMORADO. SE NI MEMORUS ĈION, PLEJOFTE NI ESTUS TIEL MALBONSTATAJ, KIEL SE NI MEMORUS NENION. ...ĈIUJ MEMORATAJ TEMPOJ, TIAL, SUFERAS MALLONGIGON; KAJ ĈI TIU MALLONGIGO DEVENAS DE LA FORIGO DE MULTEGE DA FAKTOJ, KIUJ PLENIGIS ILIN. "TIAL NI ATINGAS LA PARADOKSAN REZULTATON," DIRAS M.RIBOT, "KE UNU KONDIĈO DE MEMORADO ESTAS, KE NI FORGESU. SEN LA TUTA FORGESO DE GRANDEGA NOMBRO DA KONSCIOSTATOJ, KAJ DUMMOMENTA FORGESO DE GRANDA NOMBRO, NI NE POVUS MEMORI IOMGRADE. FORGESO, ESCEPTE DE IUJOKAZE, NE ESTAS MALSANO DE MEMORO, SED KONDIĈO DE TIES SANO KAJ VIVO."

ĈERPITA EL "PSYCHOLOGY" DE WILLIAM JAMES (PREMIER, 95¢)
ESPERANTIGIS: AEF

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## RADIO KIEL SENESPERIGILO (II)

PLI KAJ PLI EVIDENTIĜAS, KE LA DIA POTENCO KONTROLANTA TIUJN HUMILIGAJN RADIOONDOJN, KIUJ TIOM GLATE KAJ SENHALTE RAPIDAS AL LA RADIAPARATOJ DE NIAJ EŬROPAJ SAMIDEANOJ, KAJ TIOM MALE VENAS AL NI EN AMERIKO, IAL KONTRAŬAS NIAJN ESPERANTISMAJN KLOPODOJN. TIU ESTAS LA SOLA SOLVO AKCEPTEBLA, AL LA DEMANDOJ, KIAL NI NE POVAS PLI BONE AŬDI (EKZE.) RADION ROMA, KAJ KIAL NI TUTE NE POVAS AŬDI RADION VARSOVIO? KVANKAM MI NE VOLAS MIN PREZENTI KVAZAŬ SUPERSTIĈULO, TAMEN KELKFOJE MI EMAS AKCEPTI ĈI TIUN SOLVON, KAJ EBLE EKDE DUN MI SUBMURMUROS KELKAJN SORĈFRAZOJN POR KONTRAŬI DIAN POTENCON PER UZO DE SATANO.

SE VI HAVAS RADIAPARATON EKIPITAN POR MALLONGONDA RICEVO, PROVU AŬDI LA ESPERANTLINGVAJN ELSENDOJN; GRANDA LISTO TROVIĜAS EN <u>ESPERANTO</u> DE UEA. AŬ VI POVAS SKRIBI AL LA REDAKTORO DE LA JEN-BULTENO, KAJ VI RICEVOS KOPION DE LA ELSENDOLISTO. VIAJ RAPORTOJ PRI AŬDO AŬ NEAŬDO DE ESPERANTLINGVAJ ELSENDOJ SENDIĜU AL LA JEN-BULTENO.

AEF

* * * * * * * * * * * *

## ĤIRURGOJ DEVAS ESTI TRE ZORGEMAJ: EMILY DICKINSON (1830 --1886)

ĤIRURGOJ DEVAS ESTI TRE ZORGEMAJ
EKPRENANTE LA TRANĈILON.
SUB ENTRANĈOJ DELIKATAJ
EKMOVIĜAS LA KULPULO, VIVO.

TRADUKIS: AEF

## "NOVA PLANO" POR ESPERANTA PROPAGANDO

J.J. PINT

(REDAKCIA KOMENTO: KVANKAM NEK JEN, NEK TIES OFICIALA ORGANO, LA JEN-BULTENO, HAVAS STARPUNKTON RILATE LA SUGESTON EN LA SUBA ARTIKOLO, NI ESTAS KONVINKITAJ, KE ĜI TAMEN MERITAS SERIOZAN KONSIDERON EN LA ESPERANTO-MOVADO. VI CERTE HAVOS OPINION POST LEGADO DE LA ARTIKOLO. LA JEN-BULTENO DANKEME RICEVOS KAJ KONSIDEROS VIAN OPINION PRI L'AFERO.)

"SED, ĈU ĜI ESTAS PRAKTIKA?" ĈU NE OFTE VI AŬDIS TIUJN VORTOJN? VERE, PRAKTIKECO ESTAS LA ĈEFA FALIGAĴO POR LA PLIMULTO DA ESPERANTISTEMULOJ.

ĈU VI ESP-ISTIĜIS PRO LA PRAKTIKA VALORO DE ESPERANTO? MI ALIĜIS AL LA MOVADO ĈAR MI ŜATAS LA LINGVON MEM...ĜIAN LOGIKON; MI CERTE NEK KREDIS, NEK KREDAS, KE ESPERANTO TUTMONDE PAROLIĜOS KIEL ĈIUHOMA DUA LINGVO. MALFELIĈE, POR MULTAJ INTERESATOJ, LOGIKO NE ESTAS SUFIĈE...ONI DIRAS, KE HODIAŬA SCIO DE ESPERANTO VALORAS NENIOM DA STUDADO. DO, NIA MOVADO RESTAS ĈIAM MALGRANDA.

KAJ LA KAŬZO? ĜI ESTAS NIA BAZA PROPAGAND-METODO PER INDIVIDUOJ. NI DEVAS DIRI AL NEESPERANTISTO: "JEN NIA PLANO. ĈIU ESPERANTISTO INSTRUOS LA LINGVON AL ALIULO, KAJ TIU NOVA ESPERANTISTO INSTRUOS AL ALIAJ, KTP. TIEL LA MOVADO ĈIEN ETENDIĜOS KAJ BALDAŬ DUONO DE LA HOMARO ESTOS ESPERANTISTOJ. TIAM LA NACIAJ REGISTAROJ MEMVOLE ALPRENOS ĜIN." PRI TIU PLANO LA NEESPERANTISTARO DIROS, KE ĜI NE ŜAJNAS ESTI REALIGEBLA, AŬ KE ĜI ESTAS "BONA IDEO" SED ONI "NE HAVAS TEMPON," AŬ KE ONI "TROVAS ĈIUJN LINGVOJN, EĈ ONIA PROPRA, TRE MALFACILAJ. TIEL ĈI NI PERDAS ESPERANTISTEMULOJN KAJ LA UNUA ŜTUPO DE LA PLANO MALTRAFIĜAS.

KIEL RADIAMATORO, MI OFTE PAROLAS KUN HOMOJ ĈIE PRI ESPERANTO. KELKFOJE MI DONAS ĈI TIUN BAZAN PLANON: "LA ESPERANTISTOJ VOLAS, KE IAM ĈIUJ LERNEJOJ EN LA MONDO EKINSTRUOS ESPERANTON KUNE KUN LA NACIA LINGVO. POST KELKAJ JAROJ, ĈIUJ LERNANTOJ EN LA MONDO PAROLUS ESPERANTON." ĈIU PERSONO, KIU AŬDIS TIUN PLANON TRE ŜATIS ĜIN. SED BEDAŬRINDE ĜI ESTAS NUR PLANO DE KELKAJ ESPERANTISTOJ—NE BONE ORGANIZITA TUTMONDA PROJEKTO.

SED ĈU TIU ĈI DUA PLANO ESTAS PLI PRAKTIKA OL LA NUNA? KONSENTITA, KE AMBAŬ ESTAS MALFACILAJ. SED LA UNUA, LA HODIAŬA, BEZONAS, KE ĈIU INTERESATO LERNU ESPERANTON. NE TION FARINTE, ONI DEVAS EKSTERMOVADIĜI. TAMEN, SE LA ENERGIO DE LA TUTMONDA ESPERANTISTARO ESTUS EN LA ORGANIZADO DE LA DUA PLANO, LA INTERESATO TROVUS VERAN ROLON: LA ANTAŬENIGO DE INTERNACIA ADOPTO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJ. LA PLIMULTO DA PERSONOJ EN LA MONDO NE HAVAS PRAKTIKAN EBLECON LERNI ESPERANTON SEN DEVIGA LERNEJA KURSO, SED ĈIU POVUS ALIĜI AL HELP-ORGANIZAĴO KIU INSTIGUS LA NACIAJN REGISTAROJN ADOPTI UZADON DE ESPERANTO. KION VI PENSAS PRI L'AFERO?

DEZIRAS KORESPONDI...........

F-INO TATIANA KACINOVA, TURGENEVOVA 24,KOŜICE, ĈEĤOSLOVAKIO. VOLAS KORESPONDI, INTERS. BK, GRAMAFONDISKOJN. ŜATAS SPORTON. 18-JARA.

S-RO JOSZEF KARDOS, BOCSKAI,47, HODMEZŐVASARHELY, HUNGARIO; INSTRUISTO EN TEKNIKA KOLEGIO. DEZ. KOR. PRI NUNTEMPAJ AFEROJ DE LA MONDO. 28-JARA.

JERZY WESOTOWSKI, SZCZYSLIVA 6, LODZ 11, POLIO, UNIVERSITATANO, INTERESIĜAS PRI LITERATURO, FILMO, ĜENERALA KULTURO, KAJ LA VIVO EN DIVERSAJ LANDOJ. 21-JARA.

S-RO HUGO J. CERETTI, D. COLODRERO 2601, DTO.2, SANTA FE, ARGENTINO, PETAS, KE ONI EKKORESPONDU KUN ANO DE LIA E-KLASO POR KOMENCANTOJ.

S-INO EWA DZYNSKA, BYSTRZYCA KT.; UL.SLOWACKIEGO 6, POLIO, DEZ. KOR. "KUN PLI MALJUNA SINJORINO AŬ SINJORO."

F-INO TONI DETTMANN, WAISENHOFSTR.27, KIEL, GERMANIO, INTERESIĜAS PRI LITERATURO, PENTROARTO, KAJ MUZIKO; ANKAŬ VOJAĜADO EKSTERLANDEN. 26-JARA.

S-RO ABDEL GAWAD HADDAD, CONCORDIA, 115, PARANA, (ENTRE RIOS), ARGENTINIO, VOLAS INTERŜANĜI E-LIBROJN KAJ E-REVUOJN. FRAŬLO, PROFESORO. STUDAS FRANCAJN K HISPANAJN LINGVON KAJ LITERATURON. 30-JARA.

S-RO DIEGO SELSO, SAN CARLOS 44, SANTOS LUGARES, BUENOS AIRES, ARGENTINIO, DEZIRAS INTERŜANĜI BILDKARTOJN, KAJ ŜAKLUDI KORESPONDE.

S-RO FEODOR GORANKO, HRISTO BOTER 173,SOFIO 2, BULGARIO, ESTAS NOVA E-ISTO, REVIZORO EN MINISTREJO DE KEMIO KAJ METALURGIO; LERNIS ESPERANTON ĈE SOFIA UNIVERSITATO. 30-JARA

S-INO BOŽENA NAĤOVA, SVITAVY, VITĈZNA Ĉ.22, ĈEĤOSLOVAKIO, DEZIRAS KORESPONDI. DETALOJ MANKAS.

2. <u>The Harvard Esperanto Club Correspondence Course</u>. A pleasant and inexpensive way to learn Esperanto.

Combines the convenience of home study with the benefit of personal attention by a Harvard University student who is a skilled speaker of Esperanto.

Includes all that is in the Teach Yourself Esperanto Kit, plus individual guidance through a carefully planned study program of 15 lessons.

THE COST OF THE COMPLETE COURSE IS ONLY $6.00!

To order the Teach Yourself Esperanto Kit or the Harvard Esperanto Club Correspondence Course, send check or money order with the coupon below to:

ESPERANTO EDUCATION CENTER
P.O. Box 406, Cooper Station
New York 3, N. Y.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Dear Sirs:

☐ I enclose $4. Please send me a Teach Yourself Esperanto Kit immediately.

☐ I enclose $6. Please enroll me immediately in the Harvard Esperanto Club Correspondence Course.

NAME ______________________________

STREET ______________________________

CITY ____________________ ZONE __ STATE __________